



HÉROUVILLE - ESPÉRANTO 1984- 2014



BICIKLADO EN BASA NORMANDIO

De la 25a ĝis la 29a de aŭgusto 2014



La asocio HEROUVILLE ESPERANTO, okaze de sia tridekjariĝo, proponas bicikladon en Basa Normandio. Sur trankvilaj vojetoj, oni vizitos sablajn strandojn, verdajn kampojn, historiajn lokojn kaj gustumos famajn fromaĝojn kaj trinkaĵojn !

Basa Normandio estas la okcidenta parto de la nordokcidenta provinco Normandio. Ĝi konsistas el tri departementoj : Calvados(Kalvados), Orne(Orn'), Manche(Manŝ). Vi vizitos ĝian agrablan ĉefurbon Caen. En Bayeux, vi kvazaŭ spektos la invadon de Anglio en 1066 fare de duko Vilhelmo la Konkeranto kion artisme kaj precize rakontas fama, samepoka, pli ol 70 metrojn longa, brodaĵo. En Cabourg atendas vin bela strando kaj la « Grand Hôtel » kie regule feriadis la verkisto Marcel Proust. Vi laŭiros riverojn kaj kanalon kaj observos multajn marbirdojn. De la Vikingoj ĝis la surbordiĝo de la 6a de junio 1944, riĉa historio atendas vin.

Jen kelkaj itineroj (provizoraj) :

- En kaj ĉirkaŭ Caen (20 km)
- De Caen ĝis la maro, laŭ la kanalo (40 km)
- Caen, Sallenelles (birdrezervejo), Cabourg (50 km)
- Bayeux (per trajno), Arromanches (artefarita haveno de la Dua Mondmilito), Creully, Caen (70 km)
- Honfleur (per aŭto)

Bicikloj kaj biciklado :

Biciklado tre taŭgas por malkovri nian regionon sur porbiciklaj aŭ sendanĝeraj vojetoj. Kelkfoje, vento povos malhelpi vin sed la fortaj deklivoj estas malmultaj. Kvankam la distancoj ne estos tre longaj, nepre trejniĝu antaŭ nia semajno. Se vi ne povos alporti vian biciklon, ni trovos surlokan solvon. Kvankam ne deviga, kasko estas tre rekomendinda.

Restado :

Klubanoj de Hérouville Esperanto gastigos vin. Vi maten- kaj vespermanĝos ĉe ili. Ili preparos por vi nevarmajn tagmanĝojn. Ni ne garantias hotelan akcepton sed, jes ja, amikan etoson !

Tarifoj kaj aliĝkondiĉoj :

- **NIAJ GASTIGANTOJ POVAS AKCEPTI 10 HOMOJN, PRIORITATE EKSTERLANDAJN.** Sendu vian aliĝilon nepre antaŭ la 15a de majo. Ni konfirmos komence de junio.
- Aliĝo : 15 €
- Restado (tranoktado, manĝoj) : 1 tago : 25 €, 5 tagoj : 75 €

Por pliaj informoj : ivnicolas@sfr.fr



ALIĜILO (Bonvolu resendi ĝin antaŭ la 15a de MAJO)

1. Familia nomo :ARAI.....

Persona nomo :TOSHINOBU.....

Adreso : ...2-17-27-1004, IMA, KITA-KU, OKAYAMA-SHI, OKAYAMA-KEN ,
.....

Lando : ..JAPANIO.....

Retadreso : ...bin11628.....@...yahoo.co.jp.....

Telefono : ..81-86-243-6157.....

Partoprenantoj		
Nomo	Sekso	Aĝo
ARAI TOSHINOBU	VIRO	72

Restado

Alvendato :

Forirdato la :

Entute, ni restadostagojn.

Elspezoj

Ni bone notis, ke ni pagos surloke :

- Aliĝo : 15 €
- Ĉiu partoprenanto ĉiutage pagos po 25 €

Manĝaĵoj

Ĉu vi estas vegetarano ? Ĉu vi havas specifajn demandojn ?

Biciklo

Ĉu vi alportos vian biciklon ? JES, MI HAVOS MIAN BICKLON.

Se ne, kiom alta vi estas ?

Ni provos trovi taŭgan biciklon inter niaj klubanoj. Se ne, vi luprenos iun ĉe loka kaj malmultekosta asocio.

Bonvolu sendi tiun aliĝilon Antaŭ la 15a de majo al :


HEROUVILLE ESPERANTO

Maison des associations


10/18 quartier du Grand Parc

FR 14 200 Hérouville Saint Clair

Retadreso : ivnicolas@sfr.fr



Calvados estas unu el la tri departementoj de Basa Normandio. Necesas du horoj por trajne iri de Parizo al ĝia ĉefurbo, Caen (aŭte : 250 km).



CAEN : 200 000 loĝantoj. Malgraŭ gravaj damaĝoj dum la Dua Mondmilito, la urbo ankoraŭ enhavas belajn konstruaĵojn. Aparte vizitindaj estas la abatejoj kaj la kastelo, kiujn konstruigis duko Vilhelmo, konkerinto de Anglio.



Bayeux estas ĉarma urbeto, kiun vizitas multaj turistoj pro la Muzeo de la « Brodaĵo de reĝino Matilda » kaj la katedralo.



Honfleur estas tipe normanda haveno de kie forvelis

aventuremaj ŝipestroj dum pluraj jarcentoj. Ni vizitos ĝin en tuttaga ekskurso.

Bicikladu kun ni de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto en la lando de pomoj kaj de fromaĝoj !